

LATINA LINGVO

PRELEGO en ESPERANTO

*

**KULTURA KOOPERATIVO DE
ESPERANTISTOJ**

**JE LA TUTMONDA TAGO DE LA
IDIOMOJ**

la 21-an de Majo 2004

O m a ĝ o



**CARLOS TORRES
PASTORINO**

4 / nov / 1910 + 13 / jun / 1980

*En mia vivo
ESPERANTO k LATINO
estas ligitaj al Profesoro Pastorino*

Jorge das Neves

LATINA LINGVO

Aspektoj gramatikaj * Maksimoj * Latinaĵoj
Fablo de Esopo * Patro Nia

**Pri la temo JORGE DAS NEVES prelegis en ESPERANTO
en KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ
je la 21-a de Majo 2004**

ENKONDUKO kaj **resumo de la
prelego**

Komence mi dankas, ke vi ĝentile ĉeestas.

**Volas mi diri, ke mi ŝuldas al la latina lingvo la fakton,
ke mi fariĝis esperantisto.**

**Kun profunda estimo, ĉi prelego estas omaĝo al
Profesoro **CARLOS TORRES PASTORINO**,
tie-ĉi maldekstre en la foto.**



Koridore de la malnova Radio Tamojo (ĉe strato Venezuela, en la urbocentro de Rio de Janeiro), iun dimanĉan matenon en 1958, staras inter mi k Pastorino tiama profesia parolistino S-ino Maria Ĵusara, post elsendado de Esperanto-leciono sub patroneco de LBV.

Pastorino instruis al mi latinan lingvon, en Colégio Pedro II (klasika kurso) de la jaro 1949 ĝis 1951, kiam mi estis aprobita kun la noto 9,4 (laŭ mia “lerneja bulteno”).

En 1948 (mi 16jara), najbaro pruntedonis al mi ekzempleron de “Primeiro Manual de Esperanto” (unua Esperanto-manlibro), de Ismael Gomes Braga.

Tamen, verdire, mi eklernis la lingvon,

kiam **Pastorino**, poligloto, grava latinisto, surprize invitis min frekventi kune kun li Elementan Kurson de Esperanto ĉe Spiritisma Brazila Federacio.

Tiam ni ambaŭ fariĝis lernantoj de Paŭlo Ludka.

Sendube tiu invito venis al mi el la ĉielo!

La 24-an de Julio 1956 mi ricevis de lia manoj unuan ekzempleron de MÉTODO ELEMENTAR DE ESPERANTO

(Elementa Metodo de Esperanto). Eldonis BRAZILA ESPERANTO-LIGO.

Sur la kovrilpaĝo estas publikigita mia kompleta nomo

„Prof. JORGE SOARES DAS NEVES“, kiel lia kunlaboranto.

LATINA LINGVO

Kiel vi scias, latino estas la lingvo parolata de antikvaj Romanoj, kaj hodiaŭ ankoraŭ uzata de la Romankatolika Eklezio.

Proverbo de ZAMENHOF diras „ Venis fino al mia latino „ kio signifas, ke „elĉerpiĝis mia tuta scio”...

ASPEKTOJ GRAMATIKAJ

• **DEKLINACIO**

Jen la kerno de la gramatiko latina.

DEKLINACII signifas eldiri la kazaron de unu vorto.

- **KAZO** estas ĉiu el la diversaj formoj, kiujn en kelkaj lingvoj alprenas substantivo, pronomo aŭ adjektivo laŭ sia genro, nombro kaj gramatika funkcio. Ĉiu kazo havas sian specifan vortfiniĝon, t.e., “desinência” en portugala lingvo.

La klasika latina lingvo havas ses kazojn, nome:

1. NOMINATIVO

(montras subjekton de la verbo aŭ la subjektan predikativon)

2. GENITIVO

(montras posedon, kvaliton, la tuton, de kiu oni prenas parton ktp, ordinare tradukita en E-o per la prepozicioj **de** k **da** ĉe la substantivoj, k per la finiĝo **es**, ĉe la tabelpronomoj (*ies, kies, ties, nenies* ktp).

3. DATIVO

(esence montras la nerektan objekton, atribuon aŭ interesatecon, ĝenerale indikataj en E-o per la prepozicioj *al* aŭ *por*)

4. AKUZATIVO

(propre esprimas la rektan objekton de la verbo, en E-o signata per tiu N)

5. VOKATIVO

(montras la alparolata persono)

6. ABLATIVO

(propre esprimas la deirpunkton, kaj akcesore uzata por esprimi instrumenton, tempon, manieron, ĝenerale indikataj en E-o per la prepozicioj *per*, *dum*, *kun*, kaj ceteraj).

Ekzemplo de UNUA DEKLINACIO

KAZOJ	SINGULARO	TRADUKO	PLURALO	TRADUKO
Nominativo	POETA	la poeto	POETAE	la poetoj
Genitivo	POETAE	de la poeto	POETARUM	de la poetoj
Dativo	POETAE	al la poeto	POETIS	al la poetoj
Akuzativo	POETAM	la poeto	POETAS	la poetoj
Vokativo	POETA	ho poeto!	POETAE	ho poetoj!
Ablativo	POETA	kun la poeto	POETIS	kun la poetoj

Rimarku :

1. Per la traduko oni konstatas, ke latino ne havas artikolon difinitan.

2. Esperanto havas nur du kazojn.

Jen tio, kion diras la dua regulo de la **PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO**: „.... Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo; la lasta estas ricevata el la nominativo per la aldono de la finaĵo N. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj (la genitivo per DE, la dativo per AL, la ablativo per PER aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco.”

• QUI, QUAE, QUOD

En latino, la **RELATIVA PRONOMO** (ekzemple) estas komplete deklinaciata. Kiam mi estis gimnaziano, pro lernado de tiu pronomo oni laŭte kantadis en portugala lingvo:

QUI, QUAE, QUOD

konosko ningem' pode t.e. “neniu eltenas nin!”

Jen la tabelo kun komplete deklinaciado kaj E-a traduko:

S I N G U L A R O

Kazoj	vira sekso	ina sekso	neŭtrala	traduko
Nominativo	QUI	QUAE	QUOD	KIU, KIO
Genitivo	CUIUS	CUIUS	CUIUS	KIES
Dativo	CUI	CUI	CUI	AL KIU, AL KIO
Akuzativo	QUEM	QUAM	QUOD	KIUN, KION
Ablativo	QUO	QUA	QUO	EN KIU, EN KIO

P L U R A L O

<i>Kazoj</i>	<i>vira sekso</i>	<i>ina sekso</i>	<i>neŭtrala</i>	<i>traduko</i>
<i>Nominativo</i>	QUI	QUAE	QUAE	KIUJ, KIO
<i>Genitivo</i>	QUORUM	QUARUM	QUORUM	KIES
<i>Dativo</i>	QUIBUS	QUIBUS	QUIBUS	AL KIUJ, AL KIO
<i>Akuzativo</i>	QUOS	QUAS	QUAE	KIUJN, KION
<i>Ablativo</i>	QUIBUS	QUIBUS	QUIBUS	EN KIU, EN KIO

Notu bone: VOKATIVON tiuj relativoj ne havas.

Nuntempe, kiam oni ekzamenas latinan tekston, oni povas diri, ĉu tiu latinaĵo estas *arkaika, klasika, postklasika* aŭ *mezepoka*.

Kiam lernado de la latina lingvo okazis en mezlernejo, tiam (sendube) estis instruata latinon klasikan.

Estas nomataj latinidaj lingvoj, tiuj devenantaj el latino, kiel ekzemple la franca, la hispana, la itala, la portugala, la rumana. Ankaŭ estas latinida lingvo nomata romanĉo, parolata en Friulo kaj Grizono.

Friulo estas itala regiono, apud Venecio.

Grizono estas turisma kantonoen Svislando.

Oni devas konsideri, ke ĉiu latinida lingvo estas prenita el latino en diversaj fazoj de la evoluo en la historio mem de tiu baza lingvo.

Same oni devas konsideri la influon de la greka aŭ helena lingvo.

MAKSIMOJ
 estas principoj de konduto, veraĵoj pri la vivo esprimataj koncize.

Dura lex, sed lex

La leĝo estas rigora, sed ĝi estas leĝo

Vox populi, vox Dei

Voĉo de la popolo, voĉo de Dio

Quod abundat non nocet

Kio abundas, tio ne malutilas

Esto brevis et placebis

*Estu konciza kaj vi plaĉos
 (konsilo de Horaco al oratoroj)*

Si vis pacem para bellum

Se vi volas pacon antaŭzorgu militon

(Se vi timas atakon, zorgu pri sindefendo)

Mellius esse quam videre

Plej bone esti ol ŝajni

Ad kalendas graecas

Formeti ĝis la grekaj kalendoj

(prokrasti la aferon ĝis la tago de sankta Nemiamo)

LATINAĴOJ

estas io skribita aŭ parolata latine.

Est modus in rebus

Estu kontrolo en ĉio

Per fas et nefas

Trafe-maltrafe

A priori

Laŭ la unuaj impresoj

A posteriori

Laŭ la konsekvencoj

Data venia

Kun la bezonata permeso

In dubio pro reo

Okaze de dubo, estu favoro al akuzito

Habeas corpus

Ke vi havu vian korpon

Tiuj vortoj latinaj estas la unuaj de angla leĝo, donanta al akuzito la rajton resti en libereco ĝis la tago de la juĝo:

“Habeas corpus ad subjudiciendum”

(ke vi havu vian korpon por ke vi estu antaŭ la juĝisto)

Libertas quae tamen

(el poemo de la latina poeto Virgilo)

Libereco eĉ se ĝi malfruas

(devizo sur la flago de brazila landero “Minas Gerais”)

Non ducor, duco

Estas mi ne kondukata, mi kondukas

(devizo sur la flago de brazila landero “San Paŭlo”)

Mens sana in corpore sano

Sana menso en korpo sana

Mutatis mutandis

Faritaj la bezonataj modifoj

Guta cavat lapidem

Guto traboras rokon

**Eĉ guto malgranda, konsante frapante,
Traboras la monton granitan.**

(versoj en la dua strofo de la poemo

LA VOJO, de Zamenhof)

FABLO DE ESOPPO

FABLO estas rakonto, plejofte versa, en kiu agas kaj parolas bestoj, k per kiu oni prezentas moralinstruon.

ESOPPO estis ne latina, tamen helena fablisto, kies sepdek ses fabloj estas verse reverkitaj de **KALOCSAY** al Esperanto.

Ili estas publikigitaj kun la titolo **EZOPA SAĜO**.

Ordinare,
la moralinstruo en la fabloj
estas formulita komence aŭ fine.

Jen originala teksto, kiun unue deklamos mi, kiel ekzemplo,
sed poste, mi invitos vin tie-ĉi kundeklami latine k Esperante.

RANA RUPTA ET BOS

(La rano, kiu krevis, kaj la bovo)

Inops, potentem dum vult imitari, perit.

Ĉi tiu komenca verso estas la moralinstruo.
En latina rekta ordo, oni diras:

Inops perit dum vult imitari potentem.

Traduko:

Malfortulo pereas, kiam li volas imiti potenculon.

Kompleta originala teksto:

RANA RUPTA ET BOS

(La rano, kiu krevis, kaj la bovo)

Inops, potentem dum vult imitari, perit.
 In prato quondam rana conspexit bovem,
 et, takta invidia tantae magnitudinis,
 rugosam inflavit pellem; tum natos suos
 interrogavit, an bove esse latior.
 Illi negarunt. Rursus intendit cutem
 maiore nisu, et simili quaesivit modo,
 quis maior esset. Illi dixerunt, bovem.
 Novissime indignata, dum vult validius
 inflare esse, rupto iacuit corpore.

REKTA VORTORDO:

**Inops perit dum vult imitari potentem.
 Malfortulo pereas, kiam li volas imiti potenculon.
 Quondam rana conspexit bovem in Prado,
 Iam rano vidis bovon sur herbejo
 et inflavit pellem rugosam,
 kaj blove ŝveligis haŭton malglatan
 takta invidia tantae magnitudinis;
 tuŝite de ekenvio pro tiom da grandeco;
 tum interrogavit suos natos,
 tiam ĝi demandis al siaj idoj
 an esset latior bove.
 ĉu ĝi mem estas pli granda ol bovo.
 Illi negarunt.
 Ili neis tion.
 Rursus intendit cutem maiore nisu,
 Denove ĝi larĝigis la haŭton kun pli da klopodo
 et simili modo quaesivit quis esset maior.
 kaj sammaniere volis ekscii, kiu estas la plej granda.**

Illi dixerunt, bovem.
 Illi diris, la bovon.
 Novissime indignata, iacuit corpore rupto,
 Plifojeto furioza, ĝi pereis ĉar la korpo krevis
 dum vult inflare esse validius.
 kiam ĝi strebis fariĝi pli dika.

Kaj nun,

la sama fablo, kiun mi prenis el la verko

EZOPA SAĜO, de KALOCSAY.

Ni konstata, ke nia fama poeto ne esperantigis la unuan
 version
 de la originalo, ĝuste tiun, kiu enhavas la moralinstruon.

LA RANO KAJ LA BOVO

Kalocsay

Sur kamprando rano sidis,
 grasan bovos ĝi ekvidis.
 Ties grandon rigardante,
 ekenviis ĝi, kaj vante
 sian haŭton ĝi plenblovis,
 eĉ pli granda esti provis.
 “Ĉu mi dikas pli impone?”
 La ranidoj diris: “Ho, ne!”
 Ĝi pli streĉas sin, demandas:
 “Jen do, kiu nun pli grandas?”
 “Ankoraŭ ĉiam nur la bovo!”

**En furioz' laŭ tuta povo
ĝi blovege streĉe strebis,
kaj ĝi krevis.**



Finfine, ni preĝu l a t i n e kaj en E s p e r a n t o

**P A T E R N O S T E R
P A T R O N I A**

**PATRO nia, kiu estas en la ĉielo,
PATER noster, qui es in cælis,**

**sanktigata estu nomo via.
sanctificétur nomen tuum.**

**Alvenu regno via.
Advéniat regnum tuum.**

**Fariĝu via volo,
Fiat volúntas tua,**

**tiel en ĉielo kiel sur la tero.
sicut in cælo et in terra.**

**Nian panon ĉiutagan
Panem nostrum quotidiánum**

**donu al ni hodiaŭ
da nobis hódie.**

**Kaj pardonu niajn ŝuldojn,
Et dimítte nobis débita nostra,**

**same kiel ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
sicut et nos dimíttimus debitóribus.**

**Kaj ne konduku nin en tenton,
Et ne nos indúcas in tentatiónem,**

**sed liberigu nin de la malbono. Amen.
sed líbera nos a malo. Amen.**



Laŭ Zamenhofa proverbo, permesu ke mi deklaru:

Venis fino al mia latino.

Kore dankas

Jorge das Neves

poeta@infolink.com.br